# La 12an de junio 2018

## Pinta konferenco inter Trump kaj Kim

### Paca etoso ekestis…

La 12an de junio okazis pinta konferenco inter la usona prezidento Donald Trump kaj la nordkorea gvidanto Kim Jong-un en Singapuro. En la lasta jaro ili kritikis unu la alian per maldecaj vortoj, ekzemple Trump nomis Kim-on “malgranda raketviro” kaj Kim nomis Trump-on “maljuna frenezulo”, tamen subite la situacio ŝanĝiĝis. En februaro Nord-Koreio kaj Sud-Koreio partoprenis kiel unu teamo en la Vintraj Olimpikoj okazintaj en Sud-Koreio, en aprilo okazis la pinta konferenco inter la sud-korea

prezidento Moon Jae in kaj Kim Jong un (foto) en Panmunjom sur la landlimo, kaj fine okazis tiu konferenco inter Usono kaj Nord-Koreio.

Laŭ ĵurnaloj enhavo de la komuna deklaro inter Trump kaj Kim estas jene:

1. Trump donis garantion pri sekureco al Nord-Koreio, kaj Kim rekonfirmis sian devon por sennuklea korea duoninsulo.
2. Surbaze de la volo de ambaŭ popoloj por paco kaj prospero, ambaŭ landoj promesis konstrui novan rilaton inter si.
3. Ambaŭ klopodos konstrui longdaŭran pacan reĝimon en la korea duoninsulo.
4. Ambaŭ rekonfirmis « la deklaron de Panmunjom* » inter Nord-Koreio kaj Sud-Koreio.

*Deklaro inter Moon Jae in kaj Kim Jong un en aprilo

5. Nord-Koreio klopodos trovi kaj redoni cindron de militkaptitoj kaj malaperintoj dum la Korea Milito.
6. Por plenumi la rezulton de la konferenco, Mike Pompeo, sekretario de Usono, kaj nord-koreaj altranguloj komencu intertraktadon kiel eble plej frue.

Kiel taksi tiun deklaron ? Estas tre bona afero, ke Nord-Koreio kaj Sud-Koreio kaj Nord-Koreio kaj Usono ekhavis bonajn rilatojn. En la lasta jaro mi, ankaŭ multaj

japanoj, tre timis eblan militon. Trump minacis Kim per bombadoj kaj Kim same minacis Trump per nukleaj armiloj. Nia ĉefministro Abe estas lojala hundo de Trump kaj ĉiam diris, ke li estas tute samopinias kun Trump kaj subtenas lian politikon. Tio signifas, ke kiam okazos milito inter Nord-Koreio kaj Usono, Japanio fariĝos la unua celo de atakoj el Nord-Koreio, ĉar en la suda insulo Okinavo estas granda militbazo de Usono kaj same ĉirkaŭ Tokio. Se okazos tiu milito, Japanio certe pereos. Tial mi tre timis, kaj mi tre malamis la ĉefministron Abe pro lia tre danĝera sinteno. Li neniam klopodis por pacigi ambaŭ landojn, sed ĉiam sekvante Trump-on, insistis « plej grandan premon al Nord-Koreio ». Tial amikiĝo de tiuj du landoj estas tre bonvena por la japanoj, kaj mi estas tre feliĉa, sed mi ne povas estis optimisma. Internaciaj rilatoj ne estas simplaj, krome tiuj du gvidantoj ne estas fidindaj. Mi ne povas antaŭvidi, ke ankaŭ en estonteco ili plu agados racie por paco.

**La japana ĉefministro baraktas**

Abe estadis tre lojala al Trump, sed ŝajnas, ke Trump ne taksas lin alte. Kiam Trump ŝanĝis sian politikon pri Nord-Koreio de « forta premado » al « interparolo », Abe eble ne estis informita pri tiu politikŝanĝo. Li estis kvazaŭ forĵetita de Trump, kaj li estis neglektita de Kim kaj Xi Jinping, ĝenerala sekretario de Komunista Partio de Ĉinio. Li sola kaj mizere staris ekster la rondo.

En Japanio Abe perdis subtenon de popolanoj pro elŝprucintaj problemoj pro sia aroganta politiko. Kaj

denove li ne povis montri sin internacie. Lia lasta rimedo por pluvivado estis/as afero de japanaj forlogitoj al Nord-Koreio.

En 1970-aj kaj 1980-aj jaroj 17 japanoj estis forlogitaj de Nord-Koreio. El ili, kvin sukcesis reveni al Japanio en 2002, okaze de la pinta konferenco inter la japana ĉefministro Koizumi Juniĉiroo kaj la nord-korea gvidanto Kim Jong il (foto). Dum la konferenco Nord-Koreio aprobis sian kulpon pri la forlogo, kaj poste en 2004 iliaj familianoj revenis al Japanio. Sed poste Nord-Koreio rifuzis pli da esploroj pri la aliaj forlogitoj, dirante, ke la afero estas jam solvita. Krom tiuj homoj, estas ne malmultaj malaperintoj. Oni suspektas, ke ankaŭ iuj el ili estis forlogitaj de Nord-Koreio.

Abe promesadis al la popolanoj, ke li solvos tiun problemon, sed ĉar li havas malamikan politikon kontraŭ Nord-Koreio, tiu tute ne respondis afable. Por Abe la konferenco inter la du landoj estis tre bona okazo por eksolvi tiun problemon, tial li vizitis Trump-on kelkajn tagojn antaŭ la konferenco kaj li denove telefonis al tiu ĵus antaŭ ĝi, kaj petis, ke Trump parolu pri tiu temo en la konferenco. Laŭ Abe, Trump parolis pri tiu temo kaj

ankaŭ li mem diris, ke li plenumis sian promeson kun Abe, sed mi dubas tion. La ĉefa temo estas sennuklea korea duoninsulo kaj garantio de la nord-korea reĝimo. Kiam ili diskutis pri tiuj gravaj temoj, ĉu eblis tia elvojiĝado? Ja povas esti, ke Trump menciis tiu temon, sed eble en kelkaj vortoj, kaj Kim aŭdis tion, mokante Abe-on.

La deklaro de Pyongyang inter la japana ĉefministro Koizumi kaj la nord-korea gvidanto Kim Jong il en 2002 jene tekstas:

2. Japanio sincere aprobis la fakton, ke dum la pasinta japana koloniado de Koreio, Japanio suferigis multe la koreojn, kaj esprimis sinkritikon kaj petis elkoran pardonon....

Tamen Abe apartenas al ŝovinisma grupo, kiu ne aprobas japanan kulpon, nek sekssklavigon de koreaj junulinoj al japanaj soldatoj antaŭ kaj dum la dua mondmilito. Tia ĉefministro neniam povos solvi problemojn inter Japanio kaj Sud- kaj Nord-Koreio.

**Dank' al la Korea Milito Japanio ekprosperis**

Kiam mi estis studento antaŭ 60 jaroj, mi ŝatis montgrimpadon. Por tio necesis dormosako. Tiutempe preskaŭ ĉiuj montgrimpantoj uzis usonan uzitan dormosakon. Malmultekostaj dormosakoj odoris forte formole. Kial? Ĉar tiuj estis uzitaj por mortintaj soldatoj, senditaj de Koreio.

La Korea Milito okazis inter 1950 kaj 1953. Japanio estis bazo por la milito por Usono. Usonaj soldatoj flugis de usonaj militbazoj en Japanio por batali, kaj postvivintoj revenis al Japanio por ripozi kaj mortintoj revenis en dormosako por esti purigitaj kaj poste esti resenditaj al sia hejmo. Japanio, kiu suferis multe pro la dua mondmilito, revivis, rolante kiel usona militbazo kaj produktante usonajn proviantaĵojn kaj municiojn. Tiun prosperegon oni nomis "*gaĉa-man*", nome kiam maŝino bruis "klak!" (*gaĉa*), enpoŝiĝis *man*-enoj (dek mil enoj). Dank' al sango de usonaj, koreaj kaj ĉinaj soldatoj dum la Korea Milito japana ekonomio revivis kaj Japanio ekokupis gravan ekonomian rolon en la mondo.



En la Korea Milito partoprenis 16 landoj, kiuj konsistigis armeon de Unuiĝintaj Nacioj. Inter tiuj landoj estas Filipinoj, kiuj multe suferis pro la kruelaj bataloj inter Japanio kaj Usono sur sia tero. Certe Usono petis (fakte ordonis) la partoprenon kaj Filipinoj ne povis rifuzi tiun peton. Eĉ Filipinoj partoprenis, do kial ne Japanio? Dank' al la japana konstitucio, kiu malpermesis al Japanio

militon, japanoj ne verŝis sangon sur la korea duoninsulo. Usono bedaŭris, ke ĝi donis tiun konstitucion al Japanio, sed la bedaŭro venis tro malfrue. Poste Usono trudadis, ke Japanio havu armeon, kaj nun ĝi havas armesimilan korpuson nomatan “Defendkorpuso” ekipita per usonaj armiloj. Tiamaniere Japanio ĝuis nur ekonomian prosperon kaj ne oferis sangon dum tiu milito. Dume koreoj en Nodro kaj en Sudo perdis multegon, kaj subtenantaj usonaj soldatoj kaj ĉinaj soldatoj mortis multe.

Multaj japanioj ne scias aŭ forgesis tiun fakton. Dum japanaj regantaj politikistoj ne havas konon pri tiuj faktoj kaj ne dankas al Koreio, problemoj inter Japanio kaj sud- kaj nord-Koreio neniam solviĝos.